


Esperanto 282

aktuell



42. Jahr (2023) №6 (282)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



△ Partoprenantoj de la Aŭtuna Migrado. Interkultura centro Herzberg: Informoj pri Esperanto-aktivecoj en Herzberg am Harz. Aŭstria Esperanto-Federacio: Arkivo de UEA en Esperanto-Muzeo. Nekrologo kaj Funebro: Prof. Dr. Erich-Dieter Krause. El la landaj kaj fakaj ligoj: Raporto pri la studosemajnfino de Esperanto Nederland. •kune• – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Enkonduke kaj raporte pri 32-a KEKSO. Raporto pri 4-a GEJ-Semajnfino en Storkow.

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotoj kaj donacoj) /

Bankverbindung (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEFIERB, Sparkasse Odenwaldkreis, DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: **Elke Mondorf**
030 / 5106 2935, 0800 336 3636
Fax: 030 / 4193 5413

gea.oficejo@esperanto.de

Membroprizorgado / Mitgliederbetreuung
DEB: 0800 - 3 36 36 36 - 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 - 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / retmesaĝo al gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form vorname.name@esperanto.de.

Prezidanto / Vorsitzender

Martin Haase, Durchwahl: -5111
gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

Reinhard Pflüger, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl -5125

Administrado / Verwaltung

Jean-Paul Kuhfahl, Durchwahl -5124

Membroadministrado/Mitgliederverwaltung

Steffen Möller, Durchwahl -5121

Librokatalogo/Bücherkatalog

Barbara Brandenburg, barbara.brandenburg@esperanto.de

Suborganizoj / Unterorganisationen /

Erasmus+ Andreas Diemel, Durchwahl: -5114

Informteknologioj/Informationstechnologie

Franz Kruse, Durchwahl: -5119

Meza generacio / Mittlere Generation

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5126

Jugendvertreter / Junulara reprezentanto

Jonas Schulz, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5211

michael.vrazitulis@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Gazetaraj kaj publikaj aferoj

/Presse und Öffentlichkeitsarbeit

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de

Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter

für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick,

gea.zoom@esperanto.de, tel. Durchwahl -5128

Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,

Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Informmaterialo/Informationsmaterial

Goar Engländer, Durchwahl: -5127

goar.englaender@esperanto.de

Medienecho

Hermann Kroppenberg, Durchwahl: -5121

medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanz**,

Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl:

-5122, buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand

Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117

thomas.bormann@esperanto.de

Vertreter des DEB in der EEU-Versammlung/

Reprezentanto de GEA en la asembleo de

EEU: Jean-Paul Kuhfahl

Durchwahl: -5116

jean-paul.kuhfahl@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy**

(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Ulrich Brandenburg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

bibliothek@esperanto-aalen.de

bibliothek-aalen@esperanto.de

www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,

BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische

Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundes-

beauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanz**, Adressen

siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Poŝtel. +43/66473611289,

aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

ea@esperanto.de; **Stano Marček** (Martin/

Slovakio), **Yashovardhan Singh**, Im Johan-

nistal 23, 42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Aŭstria Esperanto-Federacio

Hermann Kroppenberg (Medienecho),

Utho Maier (Bibliotheken), **Peter Zilvar** (ICH)

Presejo / Druck: Alfaprint, Martin, Slovakio

Esperanto aktuel kun -kune- havas ses

numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo

(vidu maldekstre supre) por 19 €

(de eksterlando: 25 €) jare.

Esperanto aktuel mit -kune- erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 €

(Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc

a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2024/1 ĝis la

15-a de Januaro 2024. Paperaj kontribuoj nur

esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu

supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte

(im Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de,

für Nr. 2024/1 bis zum 15. Januar 2024.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann

an Yashovardhan Singh (s.o.).



Karaj legantoj,

la proksimiĝanta jarfino estas pensiga periodo, kiam oni retrorigardas al la preskaŭ pasinta eventoplena jaro, faras planojn por la estonteco kaj pensas ankaŭ pri la dumtempeco de la propra ekzisto. Nia “kapitalo” kompreneble estas niaj viglaj kaj agemaj membroj, sed ne forgesu, ke eblas subteni la Esperanto-movadon per donaco kaj eĉ heredaĵo al Esperanto-organizaĵo, kiel Germana Esperanto-Asocio aŭ Aŭstria Esperanto-Federacio. Se vi havas tiurilatajn demandojn, turnu vin al la vicprezidanto de Germana Esperanto-Asocio Andreas Emmerich, kiu povas konsili vin.

La jarŝanĝo ankaŭ pensigas pri la venonta jaro: Pri la Printempa Semajno Internacia ni jam informis en la pasinta numero de nia revuo. Iom nekutime en 2024 ne okazos Germana Esperanto-Kongreso dum Pentekosto, sed komuna “kongresaro” jam komence de Majo kune kun la franca kaj belga landaj sekcioj kaj Internacia Fervojista Esperanto-Federacio kadre de Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo (8-a – 12-a de Majo 2024). La 9-an de Majo la Eŭropa Tago festiĝos kadre de EKK kaj konvene tiu dato estas ankaŭ feritago en pluraj eŭropaj landoj (pro la kristana festo Ĉieliro). En la jaro de la eŭropaj balotoj 2024, la ideo de mondunuiga lingvo certe vekos pli da intereso ol kutime, se ni laŭte atentigos pri ĝi en tuteŭropa aranĝo. Kunlabore, ni povas krei unikan internacian etoson en la eŭropa urbo Strasburgo. Tio despli

gravas en jaro, en kiu la Universala Kongreso okazos ekstereŭrope. Per programriĉa Eŭropa Esperanto-Kongreso (kiu cetere ankoraŭ akceptas programkontribuojn!) ni kompreneble ne volas konkurenci la Universalan Kongreson en Afriko. Ni alvokas vin partopreni ankaŭ tie, ĉar la afrika UK en Aruŝa certe estos historia okazaĵo.

Grupo de senlacaj aktivuloj nuntempe prilaboras la germanajn varbilojn por Esperanto. Kiam ili estos pretaj, ni prezentos ilin ankaŭ en tiu ĉi revuo kaj vi povos mendi ilin en nia oficejo. Pri varbado kaj instruado ni parolis en du laborgrupoj dum la kunveno de la Asocia Konsilantaro en la Esperanto-urbo Herzberg komence de Novembro. Informado kaj instruado devas ankaŭ estonte ludi gravan rolon en nia movado.

La plej memorinda aŭtuna Esperanto-evento estis por mi la jubilea kultura semajnfino en Sarlando. Ĝi estis la 100-jara jubileo de Sarlanda Esperanto-Ligo kaj havis tre festecan etoson, ankaŭ dank’ al jubilea festbankedo, riĉa kultura programo kaj partoprenantoj el pluraj eŭropaj landoj.

Estas bele, ke ankaŭ retaj eventoj daŭre abundas en Esperantujo. Mi ne nur pensas pri la nuntempe okazanta Virtuala Kongreso, sed ankaŭ pri multaj malgrandaj virtualaj kunvenoj, kiuj arigas homojn el la tuta mondo. Mi rekomendas ekretumi per la retpaĝaro de *eventaservo.org*. Ĝi estas la unua paĝo, kiun mi vidas, kiam mi enŝaltas mian komputilon, kaj mi trovas tie ĉiutage interesajn retajn aranĝojn nemaltrafindajn. La paĝaro de Eventa Servo montras, kiom bunta estas nia kulturo.

Per tiu ĝojiga konstato mi finas miajn enkondukajn vortojn al tiu ĉi numero de Esperanto aktuell, dezirante al vi bonan jarŝanĝon (espereble en agrabla Esperanto-estos), feliĉan Novan Jaron kaj (kiel ĉiam) bonan legadon!

Martin Haase

Enhavtabelo/Inhalt

1: La Aŭtuna Migrado ĉe la kabano de la Eŭropa Unio. Foto: Horst Gruner (p. 9).

2: Adresoj.

3: Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavtabelo.

4: Interkultura Centro Herzberg: Informoj pri Esperanto-aktivecoj en Herzberg am Harz. Denove tre sukcesa informagado en Herzberg. Jahrestagung des Verbandsrats des Deutschen Esperanto-Bundes in der Esperanto-Stadt. Esperanto-Kulturgvidanto.

6: Aŭstria Esperanto-Federacio: Arkivo de UEA en Esperanto-Muzeo. Antaŭanonco: De Revolutionibus orbium coelestium. Viena pomostudlo.

8-9: Aranĝoj: Die 40. Internationale Esperanto Frühlingswoche findet 2024 in Bayreuth statt. 40-a! Printempa Semajno Internacia okazos en Bayreuth 2024. Sur la spuroj de Zamenhof: aŭtuna migrado ĉirkaŭ Bad Kissingen.

10-13: Historiaĵoj: “wohlgelungen” und “bonkvalita” – Nachrichten über Esperanto-Bleistifte aus dem Jahr 1924.

14: Medienecho.

15-17: Rilato al Afriko: Raporto pri mia rondvojaĝo en Germanio kun fulma vizito al Milano.

18-19: Nekrologo kaj Funebro: Prof. Dr. Erich-Dieter Krause (1935 – 2023). Abschied von Dr. habil. Erich-Dieter Krause.

20-22: El la landaj kaj fakaj ligoj: Gramatika semajnfino en Hamburgo laŭ “Pipi Ŝtrumplonga” de Astrid Lindgren. Raporto pri la studosemajnfino de Esperanto Nederland. REVELO-tago 2023 – agrabla kaj sukcesa tago. 20-a Rata Rendevuo en Hörter kun vizito de la Ĝardena Ekspozicio.

23: Publika agado: Für Europa – für Esperanto – für Zukunft. FAME-fondaĵo serĉas financadministranton.

24: Publika agado: Kalendaro. Krucenigma konkurso.

25-29: kune – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Enkonduke kaj raporto pri 32-a KEKSO. Haushaltsplan 2024. Pri mia bicikla vojaĝo de Vieno ĝis Budapeŝto. So viel mehr als nur Evildea! Raporto pri 4-a GEJ-Semajnfino en Storkow. Raporto pri ĈAR en Katowice.

30-31: Kongresoj kaj renkontiĝoj: La 108-a Universala Kongreso en Torino.

32: Fotoj el la 108-a UK de Esperanto.

Informoj pri Esperanto-aktivecoj en Herzberg am Harz

Volonte Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar akceptis la inviton de la estrino de la Kruckirko (Baptista komunumo) en Herzberg por prezenti la ideon de Esperanto kaj iom informi pri la Esperanto-urbo Herzberg. Sinjorino Renate Wolkenhauer tre ĝojis pri la akcepto kaj prezentado la 14-an de Novembro.

Unue okazis granda komuna matenmanĝubufedo dum kiu la ĉeestantoj jam petis informojn pri la historio de Esperanto en la urbo Herzberg am Harz, ekzemple: "kial Herzberg am Harz estas la Esperanto-urbo" kaj "ĉu ankaŭ aliaj urboj estas Esperanto-urboj?".

Poste Zsófia kaj Peter parolis pri Zamenhof kaj la celoj de Esperanto, iom klarigis la bazan strukturon de la senescepta gramatiko, prezentis broŝurojn pri lokaj Zamenhof- kaj Esperanto-objektoj, bildojn pri multaj dulingvaj vojmontriloj kaj tabuloj en Herzberg. Ili donis informon ankaŭ pri unu el la plej grandaj fakarkivoj kaj bibliotekoj, kiu troviĝas en Herzberg sub prizorgado de la Esperanto-Centro. Por la publiko estis novaĵo ankaŭ tio, ke ekzistas en la mondo multaj religiaj kaj fakaj grupoj, kiuj regule uzas la pontlingvon Esperanto.

Ni povis informi pri multaj avantaĝoj de la internacia lingvo Esperanto kaj pri unikaj movadaj servoj, kiel ekzemple Pasporta Servo, kiu ofertas gastigadon kaj gvidadon por en- kaj eksterlandaj vojaĝantoj.

Ni ĝojis pri la multaj demandoj, ja tio estis pruvo pri interesiĝo pri la temo. Multaj partoprenantoj miris, ke dank' al Esperanto jam homoj el pli ol sepdek landoj vizitis la ĉarman Esperanto-urbeton Herzberg am Harz. Unu el la partoprenantoj mem lernis Esperanton kaj rakontis pri siaj junaĝaj movadaj travivaĵoj.



La estrino de la baptista komunumo Renate Wolkenhauer (meze) kun Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar.

La evento donis bonŝancon por disdoni multajn diversstipajn informfoliojn pri Esperanto. Al la organizantoj ni donacis kalendaron por 2024, lernolibretojn kaj eĉ evangelian kantlibron en Esperanto. Kelkaj ĉeestantoj tuj ekinteresiĝis pri enkonduka kurseto kaj certe multaj hejme informados familianojn, konatulojn pri la bona komunikadebleco per Esperanto.

Denove tre sukcesa informagado en Herzberg

La 30-an de septembro okazis grandega kaj fama lumfesto "Jues en flamoj". Multaj lokaj kaj regionaj grupoj partoprenis la unikan kultureventon.

Ĝi okazas en trijara ritmo. La romantika kaj bela Jues-lago troviĝas meze en Herzberg, nur tricent metrojn for de nia Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg).

La urboadministracio de la Esperanto-urbo kompreneble petis kaj invitis nin por partoprenado kun granda inform-pavilono.

Volonte ni akceptis la proponon kaj deĵoris tie de la sunsubiro ĝis preskaŭ meznokto. Dum horoj preterpasis homamasoj ne nur el Herzberg, sed el la granda ĉirkaŭaĵo.

Ni kunportis kaj disdonis multajn inform- kaj varbmateriojn. Centoj da homoj petis informojn respektive amasoj da homoj laŭdis la Esperanto-agadojn kaj kampanjojn en Herzberg. Dum la jardekoj la homoj rimarkis, ke ekestis Unika Vendopunkto (germane: Alleinstellungsmerkmal).

Ni vere ĝojas, ke la Zamenhofa filozofio plaĉas (eble ankaŭ pro la aktuala milito en Eŭropo) al tre multaj homoj.

Nia inform-pavilono troviĝis ĉe irpado tuj apud la lago. Ni ekspoziciis belartisman "Japanan feliĉkarpon", kiun



Esperanto-pavilono kun kandeloj kaj lampionoj malfruvespere. Foto: Zsófia Kóródy.

ni ricevis donace antaŭ kelkaj jaroj far Japano Esperanto-Instituto. Tio estis vere okulfrapa, same kiel niaj belaj lampioj kun surgluitaj grandaj literoj de la vorto ESPERANTO.

Tiom da Esperanto-akceptado kaj laŭdado ĝojigis niajn korojn. Multjardeka senpaŭza aktivado, informado, kulturagadoj, ktp. alportas "fruktojn".

Ankaŭ la urbestro, sinjoro Christopher Wagner preterpasis nian inform-pavilonon kaj volonte akceptis niajn novtipajn nomkartojn rilate al "Esperanto-urbo".

Multaj muzikgrupoj prezentis belsonan muzikon dum la tuta vespero.

Antaŭ meznokto okazis grandaj kaj vere unikaj fajrospektakloj kaj piroteknikaĵoj.

Estis rava vespero, kiu ankoraŭ longe restos en la koroj kaj memoroj.

Jahrestagung des Verbandsrats des Deutschen Esperanto-Bundes in der Esperanto-Stadt

Am letzten Wochenende fand die Jahrestagung des Verbandsrats des Deutschen Esperanto-Bundes unter dem Vorsitz von Prof. Martin Haase aus Bamberg im Hotel "Englischer Hof" in Herzberg statt.

Zugegen waren auch die Vertreter vieler Landes- und Fachverbände. Viele Fachvertreter stellten ihre Aufgabenbereiche vor. Die Verbandsratssitzung des Deutschen Esperanto-Bundes in der Esperanto-Stadt Herzberg wurde durch den Stellvertretenden Herzberger Bürgermeister Gückel herzlich begrüßt.

U.a. gab es einen Rückblick auf den diesjährigen 100. Deutschen Esperanto-Kongress zu Pfingsten in Braunschweig. Auch wurden viele Planungsschritte für den gemeinsamen Deutsch-Französischen Esperanto-Kongress im Mai 2024 in Straßburg abgesprochen. Für

die über dreißig Teilnehmer wurden zwei Arbeitsgruppen gebildet. Die eine über Presse- und Informationsarbeit über Esperanto in Deutschland wurde von Lu von Wunsch-Rolshoven aus Berlin geleitet. Diplomsprachlehrerin Zsófia Kóródy aus Herzberg leitete die zweite Arbeitsgruppe zum Thema Esperanto und Unterricht. Es waren auch Vertreter der Deutschen Esperanto-Jugend zugegen.

Die Herzberger Filiale des Deutschen Esperanto-Bundes für Weiterbildung und Kultur unter Leitung von Peter Zilvar stellte ihr Arbeitsprogramm für das Vereinsjahr 2024 vor. U.a. soll ein Weiterbildungskurs als "Esperanto-Kulturführer" ab Februar 2024 von Herzberg aus begonnen werden. Viele Weiterbildungsangebote - auch mit internationaler Beteiligung - werden von Herzberg aus auch per Zoom ständig angeboten.

Es gab lebhaftes Diskussionen und auch viel Unterhaltung.

Esperanto-Kulturgvidanto (Nova unika klerigoferto por la estonta praktikado)

Germana Esperanto-Centro & Germana Esperanto-Instituto, Grubenhagenstrato 6, DE-37412 Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo; e-mail: esperanto-zentrum@web.de; Stato: Novembro 2023.

Aliĝfindato: 31.01.2024 (almenaŭ 7 partoprenantoj).

1. Komenco: februaro 2024 ĝis printempo 2025) en almenaŭ tri semajnfinaĵoj klerigmoduloj + TORPEDO 2024, retformaj (vesperaj) studelementoj, entute ĉ. 200 instruhoroj.

2. Krome du praktikaj taskoj, unu el tiu en Herzberg am Harz – Esperanto-urbo.

Klerigado (esceptkaze) per ZOOM-moduloj estos organizeblaj.

EGS-membroj ricevas 50 %-an rabaton (kunhelpantoj eĉ pli da rabato laŭ interkonsento), GEA- & AGEI-membroj 20 %-an rabaton.

Aliĝo (kun antaŭpago laŭ interkonsento), necesas minimume 7 partoprenantoj

Faka Esperanto-kulturklerigado (finfine por la praktika organizado de Esperanto)

Klerigelementoj: **a)** Esperanto-Kulturo; **b)** Historio de Esperanto; **c)** Kiel instali kaj organizi diversipajn elektronikajn gvidilojn? **ĉ)** Kiel organizi seminariojn, projektojn resp. kongresojn? **d)** Kiel organizi Esperanto-bibliotekon (libroj kaj gazetoj)? **e)** Kion kaj kiel organizi historiajn Esperanto-arkivmaterialojn? **f)** Kiel traduki fakajn, ekzemple kulturajn kaj turismajn tekstojn? **g)** Kiel produkti informajn flugfoliojn, bildkartojn, modernajn varbilojn, ktp.? **ĝ)** Kiel reale organizi informtabulojn, informbudon, vojmontrilojn, ktp.? **h)** Kie kaj kiel organizi diversipajn ekspoziciojn? **ĥ)** Kiel organizi Esperanto-muzikeventon? **i)** Kiel verki inform- kaj varbtekojn, ekz. por la gazetaro kaj amaskomunikiloj? **j)** Diversaĵoj. (Nomo: ...; Adreso ...; Telefono: ...; Retadreso: ...; Dato: ...; Subskribo: ...)



Arkivo de UEA en Esperantomuzeo

La Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko konservas kaj disponigas la arkivon de la Universala Esperanto-Asocio.



Afiŝoj el la arkivo de Universala Esperanto-Asocio.

Ekde sia fondo en la jaro 1927 la Esperantomuzeo disponas pri ampleksa biblioteko kaj enhaviĉa kolekto de arkivoj, kiuj oficiale nomiĝas ekde 1990 “Kolekto por Planlingvoj”. Kiel parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko ĝi plenumas ĉiajn postulojn de moderna biblioteko. La plej gravaj celoj estas laŭeble kompletigi la havaĵon per daŭra kolekto, katalogi ĝin en OPAC (Online Public Access Catalogue) kaj konservi kaj protekti la planlingvan materialon kontraŭ detruo, disfalo kaj perdo. Aliaj taskoj estas disponigi la planlingvan materialon al la publiko, respondi demandojn kaj esplori, respektive publikigi dokumentojn ĉefe en la interreto. Tiuj celoj atingiĝas per daŭra, konstanta laboro kaj per diversaj esencaj projektoj pri konservado, katalogado kaj ciferecigo.

La konservejo, kiu protektas la havaĵon de la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj, ampleksas ĉirkaŭ 180m². Ĝi estas optimume klimatizita, sekura kontraŭ ĉiaspeca detruo kaj en ĝi troviĝas ĉirkaŭ: 40 000 volumoj, 40 000 faldfolioj, 25 000 gazeteltondadoj, 22 000 fotoj kaj fotonegativoj, 20 000 manuskriptoj kaj aŭtografaj, 4 200 diversaj titoloj de gazetoj kaj revuoj, 3 500 muzeaj objektoj, 1 600 diversaj afiŝoj, 1 250 aŭdvidaj materialoj, 80 personaj kaj instituciaj arkivoj. Ĉiuj el tiuj dokumentoj estas mendeblaj por la legsalono de la Kolekto por Planlingvoj.

En 2021 la komitato de UEA akceptis la rekomendojn de la estraro, komisiono pri financo kaj konsilantaj komisiitaj fakuloj, ke la arkivo de UEA kaj neduoblaĵoj de la Biblioteko Hector Hodler, estu transdonotaj al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. La UEA-arkivo estas mondscale verŝajne la plej ampleksa unuopa arkivo pri Esperanto kaj la internacia Esperanto-movado. Ĝia abundeco ebligas profundajn kultursciencajn kaj filologiajn esplorojn pri Esperanto.



Parto de la arkivo de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo.

La transdono okazis surbaze de donackontrakto, kiu estis subskribita la 28-an de februaro 2022. La donaco estis specifita per listo, kiu estas integra parto de la kontrakto, laŭ kiu la transdono okazis sen kostoj por UEA. Tiel la donitaĵoj estis rikoltitaj en la Centra Oficejo en Roterdamo fare de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiu transprenis la kostojn de laborvojaĝoj, transportoj kaj ĉio alia rilata al la realigo de la donaco. La ekzakta kontrolado kaj zorga pakado okazis dum pluraj restadoj en Roterdamo. Per kvin transportoj entute 198 skatoloj kaj 129 skatoletoj kun arkivaĵoj, fotoj, aŭdvidaj dokumentoj, libroj, periodaĵoj kaj afiŝoj estis ekspeditaj al Vieno. La unua kaj plej granda transporto alvenis en Vieno la 19-an de aprilo 2022.

Aldone al la ĉiutagaj taskoj la bibliotekistoj en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj tuj komencis alirebligi la valoran trezoron por la publiko, paŝon post paŝo, ĉar temas pri longdaŭra projekto. Ankoraŭ en aprilo 2022 pli ol 800 skatoletoj estis en Vieno elpakitaj, kontrolitaj kaj zorge metitaj sur bretarojn en la konservejo.

Parto de la arkivo de Universala Esperanto-Asocio en Vieno.

Senprokraste, jam en printempo 2022 komenciĝis la katalogado, ciferecigo kaj restaŭrado de la dokumentoj. Ĝis novembro 2023 estis katalogitaj pli ol 2 200 libroj de la Biblioteko Hector Hodler, kiuj portas same kiel la dokumentoj el la UEA-arkivo la signon V75. Pli ol 220 el tiuj libroj jam estas ciferecigitaj kaj senpage legeblaj en la interreto. Ankaŭ pli ol 500 afiŝoj el la arkivo estas ordigitaj, katalogitaj, plejparte ciferecigitaj kaj tute libere rigardeblaj en la katalogo Trovanto kaj en ÖNB Digital.



En printempo 2023 ankaŭ komenciĝis la anstataŭigo de la originaj skatoloj per senacidaj kartonoj. La novaj ujoj ne transdonas acidajn substancojn sur la arkivaĵojn kaj ne povos difekti ilin. La laboroj dum la venontaj du jaroj koncernos la katalogadon de libroj, periodaĵoj, afiŝoj kaj la ekordigadon de la arkivo. Poste sekvos projektoj rilate la fotojn kaj aŭdvidaĵajn materialojn.

Bernhard Tuider

Antaŭanonco: De Revolutionibus orbium coelestium

**Nurenbergo 1543, de Nicolaus Copernicus.
Dulingva (Latina kaj Esperanto). Aŭtoroj:
Reinhard Fössmeier kaj Hans Michael
Maitzen.**

Jen kelkaj motivoj por verki tiun libron post la sukcesa publikigo de la libro pri Ludwig Boltzmann koncerne lian akademian vojaĝon al Kalifornio en 1905.

La titolo mem por ni havas sencon revolucian, kvankam ĝi signifas origine, ke temas pri revoluo, do rondiraj moviĝoj de ĉielkorpoj rilate al la centra ĉielobjekto, la Suno. Ni memoru, ke ĝis hodiaŭ en la germana lingvo konserviĝis la malnova bildo de "Erdkreis", kiun uzas la papo sub la formulo "Urbi et Orbi", do ĉefurbo Romo kaj diskoforma Tero. Ni konsideru, ke en tiu unua libro de Koperniko li direktas leteron al la tiama papo por klarigi sian vidpunkton. Koperniko estis pastro kaj plej eklezikonforme kondutis, neniel provoka laŭ la stilo de Galileo Galilei, kiu ja tial kondamniĝis de la papo. Kontraste al Galilei, kiu vivadis nur en Italio, Koperniko povas esti konsiderata kiel eŭropa personeco, naskiĝinta en Torun, nuntempe Pollando. Sed li studis en Bolonjo, Italio, kiun li adoris per sia konstato "Bologna – la fonte del mio sapere" (estis la fonto de mia scio). Interesa estas ankaŭ la fakto, ke tiu libro aperis nur en la mortojaro de Koperniko 1543, kiam li atingis jam altan aĝon de 70 jaroj. Kaj ĝi aperis en Nurenbergo, en la germana parto de la Sankta Imperio Romana. Kaj kiam la internacia lingvo de la scienco estis la latina. Tio estis ankaŭ motivo traduki ĝin, almenaŭ la unuan libron de la 6, en Esperanton, pro ties neŭtraleco kiel ne etna lingvo. Krom nature la mondhistoria signifo de la verko de Koperniko.

Hans Michael Maitzen, 2023-11-10



Viena pomostrudlo

Ingrediencoj: Por la strudela pasto: 250 g tre delikate muelita spelta integra faruno; ¼ tea kulereto da mara salo; 30 g sunflora oleo; 10 g pomeca vinagro; 125 g varma akvo (40 °C). Por ŝmiri la paston: 40 g sunflora oleo. Por ruligi: 50 g muelita integra spelta faruno. Por la plenigo: 100 g sultaninoj; 100 g migdaloj; 2 kg acidaj pomoj; 20 g citrona suko; 1 tea kulereto da muelita cinamo; ½ tea kulereto da raspita citronŝelo; 20 g rumo; 40 g sunflora oleo; 100 g plengrajna bulkopanero. Por ŝmiri la strudel: 40 g sunflora oleo.



Preparado: Bone grasumu la bakpleton. La ingrediencoj por la pasto devas havi ĉambrotemperaturon. Kribru la farunon en pelvo, miksu kun salo kaj la likvaj pastaĵaj ingrediencoj ĝis vi ricevas pastomason. Knedu la pastomason ĉirkaŭ kvin minutojn ĝis ĝi fariĝas glata, silka, kun iom mola konsistenco. La surfaco devus iomete brili. Rulformu la pastomason sur glata laborotablo ĝis ĝi iĝas sfero, ŝmiru ĝin per iom da oleo, kaj – kaŝante per tuko en varmigita kaserolo – lasu ĝin ripozi en varma loko minimume duonhoron. Sultaninojn por la plenigo varmege lavu kaj lasu deguti. Foliete tranĉu la migdalojn. Elŝeligu laŭvole la pomojn, kvaronigu, senkernigu, tundu aŭ tranĉu en maldikajn tranĉetojn, kaj surverŝu per la citrona suko. Enmiksi la spicojn kaj rumon kaj fine enmiksi migdalojn kaj sultaninojn kun la pomaj tranĉetoj. Varmigu la oleon, aldonu bulkopaneron, kaj sub konstanta movado brunigu ĝis orkoloro. Atentu, tio okazas tre rapide! Sternu sekigtukon (almenaŭ 50 per 70 centimetroj) sur la laborotablo, bone kovru per faruno. Lokigu la pastomason sur la tukon, farunu ĝin, kaj tre maldike ruligu ĝis ĝi kovras la tukon. Laŭ bezono, aldonu pli da faruno. Oleigu la manplaton, prenu la manplaton sub la rando de la pastomaso, kaj delikate tiru la pastomason ĉirkaŭe – tiom maldika kiel eble. Antaŭvarmigu fornon ĝis 200 °C. Levu duonon de la bulkopanera miksaĵo sub la poma plenigo. Disjetu du trionojn ĝis tri kvaronojn de la pastoplate per la restanta bulkopanera miksaĵo. Disvastigu la poman miksaĵon sur ĝin, lasante du centimetrojn da pastebenaĵo liberajn dekstre kaj maldekstre. La restantan pastobenaĵon enŝmiru per iom da oleo. Flankajn pastorandojn faldu super la plenigon per helpo de la tuko. Strudlon rulu de la flanko kun la pomplenigaĵo per helpo de la tuko. Plej bone estas levi la tukon iomete el la anguloj kaj streĉi ĝin tute – dum la strudlo memruliĝas, ĉiam sekvu la streĉitan tukon super la ruliĝanta strudlorulo. Lokigu la finfaritan strudlon sur la bakpleto, per helpo de la tuko. La kunkunigita parto estas malsupre. Ŝmiru per la duono de la oleo. Baku la strudlon dek minutojn, enpeniku per iom da oleo, malsuprenigu la temperaturon de la forno ĝis 190 °C, kaj plu baku 30 ĝis 40 minutojn. Eble kvin minutojn antaŭ la fino de la baktempo denove enpeniku per iom da oleo – tio faras la strudlon speciale krusteca.

Bonan Apetiton deziras al la legantoj
Anna Barbara Simari el Sudtirolo!!!

Die 40. Internationale Esperanto Frühlingswoche findet 2024 in Bayreuth statt

Die Internationale Frühlingswoche wird nächstes Jahr zum 40. Mal stattfinden, diesmal in der Wagner-Stadt Bayreuth in Bayern.

Wir treffen uns wie gewohnt eine ganze Woche lang, vom 25. März bis 1. April 2024. Es erwartet Euch wieder ein reichhaltiges Programm mit Vorträgen, Diskussionsrunden, Ausflügen zu den vielen Sehenswürdigkeiten Bayreuths, vielen Spielen, einem Kostümball, einem abendlichen Kulturprogramm und der traditionellen Ostereiersuche. Unser PSI-Gebäude wird der moderne Neubaukomplex der Integrationsjugendherberge Bayreuth sein.

Wir brauchen dringend eure Anmeldungen, denn die Entscheidung, ob das PSI stattfindet oder mangels Anmeldungen abgesagt wird, fällt schon Ende des Jahres 2023 und damit auch am Ende der ersten Anmeldeperiode.

Spart also Geld und meldet Euch jetzt an! Genießt zu Ostern die Esperanto-Atmosphäre und helft dem PSI zu überleben! Ein Anmeldeformular und weitere Informationen findet Ihr unter: <https://psi.esperanto.de/eo/2024/>. Oder schreibt an das PSI-Team: psi@esperanto.de – UND ... Achtung, Achtung ... es ist dringend ... Die „Internationale Esperanto-Frühlingswoche“ braucht Eure Mitarbeit! Das Organisationsteam benötigt dringend Verstärkung und Mitarbeiter für folgende Bereiche/Aufgaben: *Mitarbeit bei der Auswahl der Häuser für nachfolgende Treffen (z. B. Vertragsverhandlung, Berechnung/Festlegung einer möglichen Gebührenstruktur für die PSI-Preise auf Basis des Hausangebots, Prognose des Finanzergebnisses, zu berechnendes Budget für GEA usw.); *Vorbereitung einer neuen Internetseite (für das nächste Treffen); *Mitwirkung bei Vorbereitungstreffen (z.B. Besichtigung eines Hauses, Fotografieren von Grundrissen (alle), Einholen einer Zimmerliste mit allen Betten inkl. Bettenarten des Hauses, Vereinbarungen mit dem Haus dokumentieren und später bestätigen lassen, Ausflüge planen); *Werbung, Vorbereitung von Texten/Artikeln für die Zeitungen, regelmäßige Beiträge im Telegram/PSI-Chat, Facebook, Twitter und Instagram; *wiederholte Werbe-E-Mails an großen PSI-Verteiler (>300 Adressen); *Mithilfe bei der Vorbereitung eines zweiten Newsletters und dessen Versand, Erinnerungen vor Ablauf der Anmeldefristen; *Aufteilung der Räume, Abstimmung der Raumwünsche mit den Teilnehmern etc. *Vorbereiten von Beispieltexbausteinen für E-Mails Rechnungen und Zahlungskontrolle, *Rechnungen für Teilnehmer erstellen und einzeln versenden usw. *Aktualisieren der Webseite mit aktuellen Informationen zum Herunterladen vor und während des PSIs ... und einige andere kleine und zu erledigende Aufgaben, die in dieser kurzen Liste nicht erwähnt werden können. Detaillierte Informationen nach Vereinbarung und Interesse unter psi@esperanto.de. Vielen Dank und bis bald bei der Internationale Esperanto-Frühlingswoche **Ralf und Zoja, Stefan** (bis Ende 2023), **Klaus, Heike** und **Georg** im Namen des kleinen PSI-Teams.

40-a! Printempa Semajno Internacia okazos en Bayreuth 2024

Jam la 40-an fojon okazos la Printempa Semajno Internacia, venontjare en la Wagner-urbo Bayreuth, Bavario.

Ni renkontigos, kiel kutime por tuta semajno, de la 25-a de marto ĝis 1-a de aprilo 2024. Vin atendas denove riĉa programo kun prelegoj, diskutorondoj, ekskursoj al la multaj vidindaĵoj de Bayreuth, amaso da ludoj, kostuma balo, vespera kultura programo kaj la tradicia ovoserĉado. Nia renkontiĝejo estos la moderna, integra, nova konstruaĵkomplekso de la junulgastejo Bayreuth.

Ni urĝe bezonas vian aliĝon, ĉar decido pri okazo aŭ nuligo de PSI pro manko de aliĝoj estos JAM fine de la jaro 2023, kiu ankaŭ estas la fino de la unua aliĝperiodo. Do, ŝparu monon kaj aliĝu tuj! Ĝuu esperantujan etoson dum Pasko kaj helpu travivi PSI-on!

Aliĝilon kaj pliajn informojn vi trovos ĉe: <https://psi.esperanto.de/eo/2024/>; Aŭ skribu al la PSI-teamo: <mailto:psi@esperanto.de> – KAJ ... atenton, atenton ... urĝas ...

La renkontiĝo „Printempa Semajno Internacia“ bezonas vian kunlaboron! La organiza teamo urĝe bezonas plifortigon kaj gekunlaborantojn por jenaj kampoj/taskoj: *kunlaboro ĉe la elekto de la domoj por sekvontaj renkontiĝoj (ekz. intertraktado de la kontrakto, kalkuli/difini eblan kotizan strukturon por la PSI-prezoj surbaze de la oferto de la domo, financa rezultprognozo, buĝeton por GEA kalkuli, ktp.); *preparo de nova interreta paĝo (por la venonta renkontiĝo); *partopreno al antaŭprepara renkontiĝo (ekz. viziti domon, foti etaĝajn planojn (ĉiujn), akiri ĉambroliston kun ĉiuj litoj inkluzive de la litotipoj de la domo, dokumenti interkonsentojn kun la domo kaj konfirmi ilin poste, plani ekskursojn); *reklamado, prepari tekstojn/artikolojn por la gazetoj, regulaj afiŝoj en Telegramo/PSI babilado, Facebook, Twitter kaj Instagram; *ripetaj reklamaj retmesaĝoj al granda PSI-disendolisto (>300 adresoj); *2-an informilon kunprepari kaj sendi, memoriĝi antaŭ la fino de la aliĝperiodo; *disdonado de ĉambroj, interkonsenti kun la partoprenantoj pri ĉambrodeziroj ktp.; *prepari specimenajn tekstajn modulojn por retroŝtoj fakturoj kaj pagkontrolado, krei fakturojn por partoprenantoj kaj sendi ilin individue, ktp.; *ĝisdatigi la retejon kun ĝisdataj informoj por elŝuti antaŭ kaj dum la PSI ... – kaj pluraj aliaj malgrandaj kaj farendaj taskoj, kiuj ne estas menciitaj en tiu ĉi mallonga listo. Detalajn informojn post interkonsento kaj intereso ĉe <mailto:psi@esperanto.de>

Multan dankon kaj ĝis revido ĉe la Printempa Semajno Internacia en Bayreuth 2024.

Ralf kaj Zoja, Stefan (ĝis fino de la jaro 2023),
Klaus, Heike kaj Georg por la malgranda PSI-teamo.



Sur la spuroj de Zamenhof: aŭtuna migrado ĉirkaŭ Bad Kissingen

**La Esperanto-Migrado Aŭtuna (EMA)
fariĝis firma elemento en la programo
de Germana Esperanto-Asocio.**

EMA 2023 – de la 15-a ĝis la 20-a de oktobro – estis entute la dekunua en tiu serio, kaj la kvara organizita de Gerald Römer kaj Mariko Aoshima depost la rekomenco en 2020. Denove partoprenis preskaŭ 20 kunmigrantoj (inter ili kelkaj novuloj), kaj denove ni havis plejparte bonan veteron. Ĉi-jare do en Bad Kissingen, konata ban- kaj kuraĉloko jam ekde la 18-a jarcento. Tiun famon la urbo dankas al la sanigaj fontoj kaj al la produktado de salo, kiu dum jarcentoj garantiis enspezojn, sed ankaŭ favore influas la aeron. Eble helpis ankaŭ la vinfarado, kiu havas longan tradicion en la regiono. La terapian efikon de tiu kombinaĵo jam aprezis la episkopoj de Würzburg kaj Fulda, pluraj reĝoj de Bavario, Otto von Bismarck, caro Aleksandro II kaj imperiestrino Sissi, sed ankaŭ Ludoviko L. Zamenhof kaj sia familio. Ili restis kaj kuraciĝis tie en julio 1911. Kune kun dek aliaj famaj kuraĉlokoj en Eŭropo Bad Kissingen troviĝas sur la listo de monda heredaĵo.

Sur la spuroj de LLZ ni do kunvenis en tiu mondfama urbeto, kiu inkluzive de la ĉirkaŭaj vilaĝoj havas nur entute 23.000 enloĝantojn. Por ĉiu tago Gerald kaj Mariko estis elektintaj pli-malpli 15-kilometran itineron supren kaj malsupren laŭ la rivero Fränkische Saale, trans montojn, tra valoj kaj arbaroj. Foje ne eblis komplete realigi la planon pro neatendita faligo de arboj aŭ aliaj obstakloj, sed niaj gvidantoj ĉiam trovis bonajn alternativojn. Ni konatiĝis kun la vilao, en kiu Bismarck kutimis kuraciĝi, kun la vinloko Hammelburg (pli konata hodiaŭ pro la apuda militista ekzercejo) kaj kun kastelo Aschach, kiun eblis rigardi almenaŭ de ekstere. Kun la juna vinfaristo Daniel Six ni



grimpiis tra liaj vitejoj en la vilaĝo Wirmsthal kaj gustumis lian vinon. Kaj ĉiun posttagmezon ni sukcesis trovi agrablan lokon por kafo kaj kuko – kie ajn ni estis. Vespere en nia restadejo “Heiligenhof” partoprenantoj montris lumbildojn kaj rakontis pri la Acoroj, pri Gabono kaj ĝia ĉefurbo Libreville, pri montoj kaj glaĉeroj en Oberengadin.

Iom bedaŭrinde denove ne venis partoprenantoj el eksterlando. Eble la kutimo de aŭtunaj migradoj simple ne estas sufiĉe konata ekster Germanio. Tamen eblis eviti tro da krokodilado, kaj la etoso estis bona (la manĝaĵo cetere pli bona ol lastjare). Ne estas tute facile trovi la ĝustan kombinaĵon de vizitinda ĉirkaŭaĵo – prefere kun bone markitaj migrovojoj – kaj taŭga, ne tro kosta domo. Tio ĉi-jare bone sukcesis. Por venonta Oktobro la celo jam estas elektita: la 12-a EMA okazos denove en Vestfalio, en Arnsberg (Sauerland). Kaj por 2025 ne hezitu fari proponojn !

Ulrich Brandenburg



„wohlgelungen“ und „bonkvalita“ – Nachrichten über Esperanto-Bleistifte aus dem Jahr 1924

1923 fand in Nürnberg der bis dahin bestbesuchte Esperanto-Weltkongress statt; fast 5.000 Esperantisten aus aller Welt kamen seinerzeit zusammen.

Der Folgekongress, vom 6. bis 14. August in Wien durchgeführt, war mit 3.400 Besuchern ebenfalls recht gut besucht. Und hier, in Wien, machte Nürnberg noch einmal von sich Reden, wenn auch nur am Rande. Im *Germana Esperantisto* (No. 10, Oktober 1924, S. 187) kann man in der Rubrik „Esperanto en la praktiko“ folgenden kurzen Beitrag ohne Verfasserangabe lesen:

Esperanto-Bleistift

Zum Wiener Kongreß hat es die bekannte Bleistiftfabrik Johann Faber, Nürnberg, unternommen, einen Esperanto-Bleistift dortselbst erstmals anbieten zu lassen.

Ĝis nun! Pluvoplena vendredo meze de Oktobro gvidis min al Nederlando. Jam la veturo tra la malseka pejzaĝo de la Münsterland (ĉirkaŭ-Monastera regiono regiono) montris al mi, ke la dua paro de ŝuoj, kiun mi enpakis, estis bona ideo. Des pli bona estis la bonveno en la stacio De Riet en Almelo. La naturamika domo situas kelkajn kilometrojn for de Almelo en verda kamparo. Bovo rigardis nin, interrompinte siajn tedajn maĉadojn. Arabaj branĉoj formangis nian automobilon, atinginte nian domon. Varma supo refreŝigis nin, nur la sandviĉoj dum la unua vespero estis mem kunportindaj. Mi kiel germano devis alkitimiĝi al la mola nederlanda pano, sed dank' al la varmkora prizorgado de la kuireja teamo tio estis facila. La loĝado estas baznivela, sed feliĉe ni ne devis uzi etaĝlitojn. Enhave la progresinta grupo estis gvidita de Federico Gobbo, profesoro el Amsterdamo. Kadre de eldono de "Literatura Mondo" el la jaro 1922 ni tralaboris kvar tekstojn, de amrakonto ĝis teatraĵo, por malkovri la mondon de Julio Baghy kaj Kalman Kalocsay. Kun granda entuziasmo Federico gvidis tra la komenco de la literatura historio de Esperanto kaj same entuziasme la partoprenantoj traverkis la tekstojn kaj analizis la enhavon. Poste la Krikkenhaar Naŭopo, kiel la grupo intertempe nomis sin, elverkis propran tekston, inspiritan de la legaĵoj el la Literatura Mondo. Kiu ŝatas ĝin legi, povus studi la nederlandan EO-gazeton Fenikso, troveblan ankaŭ en la retejo de la asocio. La venonta studosemajnfino okazos de la 12-a ĝis 14-a de Aprilo 2024 same en Krikkenhaar apud Almelo, eventaservo.org/e/studosemajnfino.

Andreas Diemel



REVELO-tago 2023 – agrabla kaj sukcesa tago (aŭ eĉ semajnfino)

La ĉi-jara renkontiĝo de la Rejnland-Vestfalia Esperanto-Ligo (REVELO) okazis la 7-an de oktobro en la kuraĉloko Bad Salzuflen en okcidenta Vestfalio.

La renkonteĵo estis la bela malnova vilao "Villa Dürkopp", en kiu troviĝas nuntempe hotelo kun konferencejo. Samloke okazis en tiu semajnfino la jara renkontiĝo de la Germana Fervojista Asocio (GEFA), kaj la anoj de ambaŭ asocioj pasigis parton de la tago kune. Kelkaj el la REVEL-anoj kaptis la okazon kaj alvenis al la hotelo jam vendredvespere kaj/aŭ restis ĝis dimanĉo, farante el la REVELO-tago tutsemajnfinaĵojn.

La mateno komenciĝis, kiel kutime, per amikeca kafumado ekde la 10-a horo, kiun sekvis la ĉi-jara membrokunveno de REVELO. Unu el la tagorderoj estis la (re-)elektado de la liga estraro. Nova estrarano estas nun Harald Schmitz el Pulheim, kiu estas la posteulo de Heinz Muhsal kiel kasisto post tre multaj jaroj. Ĉiuj aliaj estraranoj estis reelektitaj. Krom la elektoj la ĉeestantoj rerigardis al la pasintjaraj Esperanto-okazaĵoj en Nordrejn-Vestfalio kaj ankaŭ pripensis la estontan agadon, ekz. novajn eblojn okazigi semajnfinaĵojn Esperanto-kursojn kaj trejni novajn kursgvidantojn. Post la tagmanĝa paŭzo sekvis tre interesa urbogvidado tra Bad Salzuflen. Dum ĝi la partoprenantoj eksciis multajn informojn pri la historio kaj nuntempo de la urbo (ne nur kiel kuraĉloko). Inter la vizitataj vidindaĵoj estis la malnova urbocentro, la kuraĉloka parko kaj la salkolekta muro (kiun oni povis rigardi eĉ de interne). La oficiala programo de la REVELO-tago finiĝis per komuna vespermanĝo. Sed pro tiuj, kiuj restis ĝis dimanĉo, ankoraŭ sekvis gaja kunestado en la vilao (kiel jam vendrede por la fru-alvenintoj). Resume, ĉiuj partoprenantoj konsentis, ke ĉi-jare la REVELO-tago estis ne nur aparte longa, sed ankaŭ tre sukcesa, agrabla kaj amikeca.

Martin Brüggemeier





20-a Rata Rendevuo en Höxter kun vizito de la Ĝardena Ekspozicio

Jam la 20-an fojon la Esperanto-grupo Hamelno invitis amikojn de la internacia lingvo al la Rata Rendevuo.

Ĉi-foje oni renkontis unu la aliajn en Höxter. Venis ne nur homoj el la proksimeco, sed ankaŭ el Bremeno, Duisburg kaj la rur-regiono kaj eĉ el Antverpeno en Belgio.

Ĉe bela vetero oni unue renkontiĝis en la kafejo “La apoteko” por trinki kafon kaj saluti unu la aliajn. Tamen oni devis atenti la tempon, ĉar la ŝipo ja ne atendus nin.

Ni kune iris al la albordiĝejo, sidiĝis en la ŝipo aŭ ekstere kaj dum plezura veturado sur la rivero Vezero povis jam vidi ĉe la bordo de la Vezero multajn objektojn kaj florojn de la Landa Ĝardena Ekspozicio.

Alveninte en Corvey, kie staras impona monaĥejo, jam akceptis nin nia ĉiĉerono.

Li bone klarigis al ni la partojn de la Remter-ĝardeno, atentigis nin pri sanigaj herboj, montris al ni la plantojn en la legoma ĝardeno, kiujn la homoj manĝis en la mezepoko

ankoraŭ ne sciante ion pri ekzotikaj fruktoj, kondukis nin al la rozĝardeno, kie li lasis al ni sufiĉe da tempo por mem esplori la florojn, admiri ties belecon kaj flari la belan odoron.

Pli kaj pli ni proksimiĝis al la ĉefa centro kun scenejo kaj restoracio vagante tra lavendula kampo kaj arkeologia tereno, kie iam troviĝis la urbo Corvey.

En la “Flora gastronomio” per bona tagmanĝo ni fortiĝis denove kaj havis eblecon iom ripozi kaj babilu kune.

Poste ĉiuj havis eblecon laŭplaĉe sole aŭ en grupetoj rigardi la aliajn partojn de la ekspozicio pli kaj pli alproksimiĝante al la urbo Höxter, dum aliaj ne timis karesi danĝerajn bestojn – nu, fakte ne tiom danĝeraj, ĉar faritaj el metala rubo bele rustiĝita. Kelkaj rigardis la foiron kaj aĉetumis, kelkaj la prezentaĵojn sur la scenejo kun ekzemple bonega ĵonglado, aliaj jam pli rapide iris al la malnova urbocentro por iom rigardi la belajn trabfakajn domojn. Kaj fine ni denove renkontiĝis en “La apoteko”, kie ni donacis al ni bongustan glaciaĵon aŭ varman kafon. Pasis rapide bela tago kaj ĉiuj ne nur ĝuis la belan ekspozicion, sed ĉefe ankaŭ la babiladon kun amikoj, kiujn ili longe ne vidis.

Certe ankaŭ en la venonta jaro okazos denove Rata Rendevuo. Sed antaŭe ni ankoraŭ invitas al nia antaŭ-kristnaska festo kaj venontjare denove al nia ĝardena festo. Krome denove okazos Reta Esperanto-Kurso por germanlingvaj komencantoj. Pliaj informoj sur la paĝoj https://eventaservo.org/o/RB_Hameln aŭ <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/hameln/kalendaro>.

Heinz-Wilhelm Sprick



Für Europa - für Esperanto - für Zukunft

Unterschriftensammeln für die politische Teilnahme.

Es ist wieder Gelegenheit im Freundes- und Bekanntenkreis, auf der Straße oder bei anderen Gelegenheiten das Sprachenthema in die Öffentlichkeit zu tragen.

Allgemein bekannt ist, dass EDE - Europa Demokratie Esperanto an der Wahl zum Europaparlament 2024 teilnehmen möchte. Hierzu sind 4000 Unterstützungsunterschriften von in Deutschland Wahlberechtigten nötig. Diese Unterschriften bestätigen nur, dass die Wahlberechtigten möchten, dass EDE zur Wahl antreten darf und können je Wahl (EU, Kommune, ...) nur ein mal abgegeben werden. Eine Unterstützungsunterschrift verpflichtet NICHT, EDE zu wählen. Auch kann jede Unterstützerin Mitglied einer anderen Partei sein. Nähere Informationen finden sich auf der Webseite de.e-d-e.eu. Esperanto Gruppen können dies zum Anlass nehmen, gerade in dieser Zeit den "Marktwert" von Esperanto zu prüfen. Ein hartes Geschäft - billiges Lob gibt es häufig, ehrliche Anerkennung in Form einer Unterschrift ist schwer verdient. Es gilt zu bedenken, dass wer rausgeht auch Werbung für die eigene Gruppe und Esperanto vor Ort machen kann.

Am 29. Februar 2024 ist Stichtag.
Vorstand von EDE-Deutschland

Konrad Gamelspacher prezentantas la partion dum la 100a Germana Esperanto-Kongreso en Brunsvigo. ▼

FAME-fondaĵo serĉas financ- administranton

La longjara financa estrarano de la FAME-fondaĵo por internaciaj kompreniloj, Reinhard Pflüger, transprenis la postenon de kasisto de GEA kaj pro tio ne povas daŭrigi sian ĝisnunan postenon.

La transdono al posteulo ne funkciis kiel planite, do nun FAME serĉas homon, kiu pretas okupiĝi honorofice pri ĝiaj financoj.

FAME estas ĉefe konata pro la kulturpremio, kiun ĝi donas kun la urbo Aalen ĉiun duan jaron. Ĉar la financaj rimedoj estas limigitaj kaj sekve ankaŭ la aktivado preter tiu premio estas malmulta, la tasko ne estas tre temporaba. Samkaŭze ĝi iom malsimilas al tiu de asocia kasisto. Ĉefa temo estas la administrado de la posedaĵoj, precipe kontado de rentoj kaj dividendoj kaj laŭbezone aĉeto kaj vendo de valorpaperoj. Tamen ne necesas profesinivelaj scioj pri tiu temo, ĉar la plej gravajn decidojn ĉiam faras la tuta estraro kaj en kazo de bezono la ĝisnuna financadministranto volonte donas konsilojn. Ankaŭ, kvankam la ricevataj kaj kreendaj dokumentoj estas germanlingvaj, ne necesas esti gepatralingva germano. La vortostoko por la plej multaj aferoj estas tre limigita, tial sufiĉas A2-scioj de la germana (eble eĉ malpli) plus mallonga enkonduko en specifajn terminojn (kiun Reinhard Pflüger pretas doni), kun helpo de aliaj personoj en la malmultaj okazoj ke tiuj scioj ne sufiĉas. La serĉata persono unue plenumu sian taskon komisie kaj ĉe la novelekto de la estraro en 2024 fariĝu ties ano.



Kalendaro

Decembro 2023 – Januaro 2024

27. Decembro 2023 – 02. Januaro 2024. Luminesk' sur la insulo Norderney, Germanio. Informoj ĉe <https://www.esperanto.de/de/luminesk>

27. Decembro 2023 – 03. Januaro 2024.

Junulara Esperanto-Semajno en Storkow, Germanio. Informoj ĉe <http://jes.pej.pl/eo/>

27. Decembro 2023 – 02. Januaro 2024. Novjara

Renkontiĝo (NR) en Wiesbaden, Germanio.

Informoj ĉe <http://esperanto.land/de/>



Marto 2024

16. - 17. Marto 2024. Gramatika semajnfino en Hamburgo laŭ "Pipi Ŝtrumplonga" de Astrid Lindgren kaj konverto de Jonny M. Informoj kaj aliĝoj: info@esperanto-hamburg.de

25. Marto 2023 – 01. Aprilo 2024. 40-a Printempa

Semanario Internacia (PSI) en Bayreuth, Germanio.

Informoj ĉe <https://psi.esperanto.de>

25. marto – 01. Aprilo 2024. 40-a Printempa Semanario

Internacia (PSI) en Bayreuth, Germanio. Informoj ĉe <https://psi.esperanto.de>

Majo 2024

08. - 12. Majo 2024 en Strasbourg, Francio. 101-a

Germana Esperanto-Kongreso / 101. Deutscher Esperantokongress 75-a Kongreso de la Internacia

Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) Eŭropa

Esperanto-Kongreso. Informoj : <https://esperanto-france.org/europa-kongreso-2024>. <https://www.esperanto.de/eo/enhavo/deutscher-esperanto-kongress-germana-esperanto-kongreso-2024>. Estas publikigitaj informoj pri aliĝo

kaj loĝado en la paĝaro de GEA (Germana Esperanto Asocio): <https://www.esperanto.de/eo/ee2024-aligho>

08. - 12. Majo 2024 en Hameln, Germanio. 63-a Berlina

Arbara Renkontiĝo (BARO). Plilongigata semajnfino sen

fiksita programo, por amuziĝi; kunportu viajn infanojn.

Informoj ĉe <https://krokodilo.de/baro/baro.php>

Aŭgusto 2024


03. - 10. Aŭgusto 2024 en Arusha, Tanzanio. 109-a

Universala Esperanto Kongreso. Informoj kaj aliĝo ĉe

<https://uea.org/kongresoj/UK/2024>

Krucenigma konkurso

La kaŝitajn proverbojn bv. sendi al la redakcio. Unu el la solvintoj (decidos loto) ricevos donace la verkon "107 krucenigmoj en Esperanto" de Stano Marček.



★	LA UNUA KAŜITA PROVERBO	FINAĜO DE SUBSTANTIVO	★	LAND-KODO DE BANGLADEŝO	RELIGIA CERE-MONIA'	OKUP', PROFESI'	LA DUA KAŜITA PROVERBO
DISTRIBUA PREPOZICIO			ORNAMA JUVEL'				
SIMBOLO DE OKSIGENO		INSPIRI PIAJN SENTOJN BRILA GLOBETO	IAMAN				
RESPOND-KUPONO				MONTRA PRONOMO			
KOMENCI NE ESTI				INFAN'			
PAŜADI					KALI-FORNIO		
OST' EN ANTAŬ-BRAKO					RILATA AL EU-LANDO		
NOMO DE LA 7-A LITERO				ALTA KONSTRUAĴ'			NULO
SIMBOLO DE AMPERO				PIED-VEST'			EKSKRE-MENTA LIKVAĜO
MALOFTA (RADIKO)				PORTATA PEZAĴ'			
DIAFANA JUVEL-STON'				GRANDA VESP'			
ELEMENTO (Er)				RILATA AL HINDA LABORISTO ALTA TAKS'			
PART' DE SANGO					KLINK'		
LAND-KODO DE TANZANIO					VIRSEKSA PRONOMO		
ADJEKTIVA FINAĜO					FUTURA FINAĜO		
STRATO (MIL.)					AŬD-ORGANO		
SINSEKŬ' DE MAL-AGRABLAJ VOKALOJ							VERBA FINAĜO
PLIBELIGAĴ'							ELUZI, ELFROTI
SUMAKO, VENENA ARBO					DENOVA PREFIKSO ĈE PARENCOJ		
SIMBOLO DE OSMIO					CEFURB' DE SVISIO		
					AKVO-FERMILO		
					GRANDEG-UL' MOVOS AL SI		
					POEMO		
					SIMB. DE TANTALO		
						SIMB. DE IRIDIO	
						MUTA ARTIST'	
							TUNO
							PREPOZICIO
					PLAN-LINGVO		
					LA SESA TONO		
					FINO DE PREGO		

Solve el la antaŭa n-ro: Kiu bati deziras, trovas bastonon. La premion gajnis: Wolfgang Pflügler. Gratulon!

Enkonduke kaj raporte pri 32-a KEKSO

Karaj legantoj! Kiam mi skribas ĉi tion, ĵus finiĝis la 32-a KEKSO en Hamburgo, kiu okazis de la 10-a ĝis la 12-a de Novembro 2023. Tiu renkontiĝo, kiun ni kiel GEJ organizis, estis tre agrabla. Ni estis entute 27 junaj homoj, 13 el ili fakte komencantoj de Esperanto! Samtempe multaj estis gastoj el Tuluzo, Francio, danke al subvencia vojaĝigo de ili fare de Esperanto-Kultur-Centro (EKC) Tuluzo.

Dum la evento, krom la nepra distriĝo kaj amuziĝo, realiĝis lingvo-kurso de Esperanto por komencantoj kaj paralele al tio ankaŭ trejnado pri sekurspacigo de internaciaj junularaj aranĝoj, kiu provokis interesan kaj produkteman diskuton. Ni KEKSO-anoj cetere ankaŭ renkontiĝis sabaton posttagmeze kun membroj de Esperanto Hamburg, do la loka Esperanto-asocio, kiu fakte tre ĝentile ankaŭ kun-financis tiun ĉi KEKSO-n. Bedaŭrinde KEKSO jam devis finiĝi post du tagoj. Kelkaj adiaŭoj tamen ne estis tiom korŝiraj, ĉar multaj el ni ja vidos unuj la aliajn denove jam post nur unu monato kaj duono – dum silvestro, ĉe JES!

Cetere, tiu ĉi eldono de ·kune· enhavas tre buntajn kaj diversajn kontribuojn: Nia kasisto Lino prezentas al vi ellaboritan antaŭvidan buĝeton por la jaro 2024 ("Haushaltsplan"). Daŭrigante, Tabea kundividas kelkajn impresojn de sia bicikla vojaĝo de Vieno al Budapeŝto, ĉiam laŭ



Lingvokurso por komencantoj
dum 32-a KEKSO.



Grupfoto de 32-a KEKSO en Hamburgo.



Ekskurso al Hamburga urbocentro en dimanĉa posttagmezo, 32-a KEKSO.

la rivero Danubo. Vi poste ankoraŭ trovos artikolon de Stefan pri la dek plej famaj/spektataj YouTube-kanaloj Esperantaj. Fine, denove sekvas raportoj pri eventoj, kiujn iuj el niaj aktivuloj antaŭ nelonge partoprenis: Utku priskribas sian sperton ĉe la 4-a GEJ-Semajfino, kiu okazis de la 20-a ĝis 22-a de Oktobro en Hirschluch, Storkow, kaj cetere iom funkciis kiel preparakunsido por la JES, okazonta ĉirkaŭ Silvestro kaj Novjariĝo, do sufiĉe baldaŭ, ĝuste en la sama loko. Lino, aliflanke, laste raportas pri Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo (ĈAR), semajnfina evento aranĝita de PEJ (Pola Esperanto-Junularo) ĉi-septembre.

Kiel ĉiam, ĝuu la legadon, kaj mem sendu kontribuojn por la sekva eldono, se vi estas junulo. Eblas ĉiam sendi al kune@esperanto.de :)

Michael Vrazitulis,
nome de la ·kune·-redakcio

Pri mia bicikla vojaĝo de Vieno ĝis Budapeŝto

Kiam mi ĉi-somere rakontis al mia patrino, ke mi decidis bicikli laŭ la rivero Danubo de Vieno al Budapeŝto, ŝia vizaĝo heliĝis: Ĵus ŝia amikino Beate rakontis al ŝi, ke ŝi duonvoje inter tiuj du urboj forgesis spican hungaran salamon en la fridujo de ŝia tendumejo. Tre bone, nun mi ne nur havis (fragmentan) vojaĝplanon, sed eĉ mision: trovi la perditan salamon.

Anstataŭ detale plani mian vojaĝon, mi ĉe Duolingo lernis kelkajn ofte bezonatajn frazojn (ekzemple “mi ĝojas” – “örülök”), pruntis biciklan remorkon de mia patro, kaj surtrajniĝis al Vieno. Post nokto sur la sofo de malnova amiko el Esperantujo kaj multaj Vienaj kafoj mi iam

Haushaltsplan 2024

Der Haushaltsplan des Vereins soll die Mitglieder in die Lage versetzen die geplanten Ein- und Ausgaben des Vereins nachzuvollziehen und die geplante Verwendung der eingenommenen Gelder aufzeigen. Damit das gelingt möchte ich den Haushaltsplan und die darin aufgeführten Posten ein wenig erklären. Wer den Haushaltsplan für das Jahr 2023 noch vor Augen hat, wird einen grundlegenden Unterschied feststellen. Im Vorjahr bestand der Haushaltsplan aus einer Einnahmen-Überschuss-Rechnung (EÜR), in der die mit unseren Treffen (JES, KEKSO) verbundenen Einnahmen und Ausgaben saldiert aufgeführt wurden.

In einer EÜR werden Zahlungen grundsätzlich zum Zeitpunkt ihres Ein- bzw. Ausganges veranschlagt. Da das JES über den Jahreswechsel und damit über die Grenze von zwei wirtschaftlichen Perioden stattfindet, war die Wirtschaftlichkeit des Treffens in dieser Form nicht klar ersichtlich. Ich habe die Form des Haushaltsplanes abgeändert, in der Hoffnung, dass die Finanzen des Vereins damit für alle transparenter werden. In der jetzigen Form werden alle mit dem JES verbundenen Aufwände und Erträge in einer Periode so erfasst, dass dabei klar wird wie viel Geld wir umsetzen und mit welchem Gewinn bzw. Verlust wir dabei tatsächlich rechnen. Die Annahmen im Haushaltsplan basieren auf dem Haushaltsplan 2023 und den tatsächlichen Einnahmen und Ausgaben im laufenden Jahr 2023.

Jonas “Lino” Schulz, Kassenwart

Gewinn- und Verlustrechnung (Plan)		
	Plan 2023	Plan 2024
GuV (Nettowerte)		
Umsatzerlöse		56.600
... davon KEKSOj	saldiert	2.600
... davon JES	saldiert	54.000
... davon GEJ-Semajfino		150
Gesamtleistung		57.840
Aufwendungen KEKSO	saldiert	2.900
Aufwendungen JES	saldiert	55.500
... davon Miete und Verpflegung		48.000
... davon sonstige Aufwendungen		7.500
Aufwendungen GEJ Semajfino		150
Rohertrag	-15.300	-710
sonstige Erträge	1.000	1.240
... davon Spenden	0	240
... davon Mitgliedsbeiträge	1.000	1.000
... davon Fördergelder	0	0
betriebliches Rohergebnis	-14.300	530
Personalaufwand	saldiert	0
Abschreibungen		
sonstige Aufwendungen	3.160	3.096
... davon Verwaltung	2.000	2.000
... davon Versicherungen/Beiträge	260	271
... davon Vorstandskosten	150	150
... davon Vorstandswechsel	150	150
... davon Organisationstreffen	250	250
... davon Werbungskosten		100
... davon Kosten des Zahlungsverkehrs	300	125
... davon sonstige Kosten	50	50
Betriebsergebnis	-17.460	-2.566
sonstige Zinsen und ähnliche Erträge	0	0
Zinsen und ähnliche Aufwendungen		0
Zinsergebnis	0	0
Geschäftsergebnis	-17.460	-2.566
außerordentliche Erträge		
außerordentliche Aufwendungen		
außerordentliches Ergebnis	0	0
Steuern vom Einkommen und Ertrag		
sonstige Steuern		
Jahresüberschuss/-fehlbetrag	-17.460	-2.566



Biciklante laŭ la Danubo.

posttagmeze ekbiciklis unue Bratislaven. La du ĉefurboj je 55 km distanco estas la du plej proksimaj ene de Eŭropo (ne kalkulante la Vatikanon, kiu ja situas eĉ ene de Romo). Ilin konektas tre bela, rektega bicikla vojo, je kies flanko sin banas la Vienaj nudistoj.

La sekvajn tagojn mi regule transiris la Danubon kaj landlimon inter Slovakio kaj Hungario, ĉiam serĉante la pli belajn padojn kaj la pli oportunajn vendejajn malfermhorojn. Bedaŭrinde antaŭ kelkaj jaroj la pramisto, kiu malantaŭ Esztergom dum jaroj transveturigadis homojn trans la rivero, mortis sen posteulo. Kaj bedaŭrinde mi tion malkovris ĝuste en la momento, en kiu mi staris je



La "trinkejo".

unu flanko de la Danubo kaj nepre volis ĝin transveturi al la alia, tien kie laŭ la raportoj de ĉiuj hungariemuloj, kun kiuj mi parolis, troviĝas unu de la plej belaj regionoj de Eŭropo. Mi do elspezis la tagon vizitante ĉiujn pramejojn, kiujn montris al mi mia mapo, kaj lernis de diversaj afablaj lokuloj la kaŭzojn, kial dummomente ankaŭ ne funkciis la pramo de ilia respektiva vilaĝo. Kvankam mi pri la transiro restis sensukcesa ĝis Visegrád, mi eksciis kiel la hungaroj elspezas siajn lastajn aŭtunajn suntagojn per boatumi, bicikli kaj bone manĝi.

Fine alveninte je la alia flanko, mi volis iri al trinkejo, kiun rekomendis al mi amikino. La "trinkejo" estas ege granda herbejo, sur kiu staras porkoj, kaproj, tendoj kaj arboj. Fine mi sur la herbejo trovis du homojn, kiuj sidis apud fajro kaj ofertis al mi trinkaĵon. La virino montris al mi ŝtonon, kiu aspektis kiel homa vizaĝo, krome fungaron, kiu kreskis sur tablo, kaj foton de muso, kiu dum la tago vizitis por manĝi maizon. Mi plene komprenis, kial homoj enamiĝas kun tiu ĉi regiono.

Je la postsekvanta tago mi atingis Budapeŝton. Kiel estas la kutimo por tiaspecaj vojaĝoj, mi dum ĝi ankaŭ trovis min mem. Sed, pli grave: mi trovis la salamon, kiu kiel priskribite al mi ankoraŭ estis en la maldekstra, malantaŭa angulo en la supra fako de la fridujo sur tendumejo en Komárom. Reveninte hejmen, mi sendis ĝin al Beate.

Tabea Maltry



Biciklante laŭ la Danubo.

So viel mehr als nur Evildea!

In den letzten Jahren ist Esperanto auf YouTube geradezu aufgeblüht und es gibt mittlerweile eine Vielzahl von Kanälen zu den unterschiedlichsten Themen und eine aktive Gemeinschaft von Kreativen. In diesem Artikel gibt es einen kleinen Überblick über die 20 beliebtesten Kanäle.

YouTube hat mittlerweile ein lebendiges und aktives Ökosystem von Esperanto-Kanälen zu den unterschiedlichsten Themen. Hier sollen die 20 beliebtesten, d.h. die 20 Kanäle mit den meisten Abos genauer vorgestellt werden. Ein Blick auf die kleineren Kanäle zu werfen, die hier leider nicht genauer beschrieben werden können, lohnt sich aber ebenso. Empfehlenswert sind u. a. auch die Kanäle Ĉi Tie Nun, D-ro Kongo, Jozefo, D-ro Loĉjo, Eterna krokodilanto oder die Kanäle von

Katalin Kovats und Chuck Smith. Aber das würde hier den Rahmen sprengen, deswegen direkt zur Topliste der größten 20:

#20 Ekstremoj – über 1700 Abos

Ekstremoj ist ein älterer Kanal mit klassischem Fokus auf Esperanto Musik, Kultur und Veranstaltungen.

#19 Oliver rakontas – über 1700 Abos

Oliver ist ein sehr aktiver österreichischer Lehrer, der Videos zu vielen Wissensthemen auf Esperanto veröffentlicht. Aber auch andere Themen wie Buchbesprechungen sind immer wieder im Programm.

#18 Catie Kejti – über 1800 Abos

Catie ist eine junge Amerikanerin, die über ihr Leben und verschiedene Themen auf Esperanto spricht. Sie ist außerdem Mutter und erzieht ihr Kind zweisprachig auf Esperanto. Catie ist auch eine aktive Esperanto-TikTokerin.

#17 Scivolemo – über 1800 Abos

Scivolemo ist ein Wissenschaftskanal auf Esperanto, der kurze Mini-Dokumentationen und Erklärvideos zu verschiedensten Themen veröffentlicht. Oft handelt es sich um neusynchronisierte vorhandene Videos aus Quellen wie der NASA oder dem ZDF.

#16 EsperantoUSA – über 2000 Abos

Der Kanal der amerikanischen Esperantisten ist erst in den letzten Jahren sehr aktiv gewesen und man findet dort neben allgemeinen Neuigkeiten über Esperanto in den USA auch alle Filme des nun schon zum fünften mal stattgefundenen Kurzfilm-Festivals "Usona Bona Film-Festivalo".

#15 VINILKOSMO Esperanto-Muzik-Prod – über 2000 Abos

Unser aller Lieblings-Musiklabel veröffentlicht hier regelmäßige Musik auf Esperanto.

#14 Jonny M – über 2000 Abos

Musik und Lets Plays von Jonas Marx.

#13 Jacinto Yogui – über 2100 Abos

Ein mittlerweile seit über fünf Jahren inaktiver Kanal mit viel Musik auf Esperanto und Aufnahmen über Esperanto-Veranstaltungen.

#12 Jomart – über 2400 Abos

Der Kanal der Musiker Jomart kaj Nataša.

11 Learn Esperanto - Direct Method – über 2500 Abos

Dieser Zweitkanal von Evildea unterrichtet Esperanto mit der „Direkten Methode“, d. h. völlig einsprachig und ohne Übersetzungen. Das funktioniert erstaunlich gut und ist auch für alle, die schon gut Esperanto sprechen, einen Blick wert.

10 Federación Española de Esperanto – über 2600 Abos

Der Kanal der Spanischen Esperanto-Föderation veröffentlicht hauptsächlich Aufnahmen von Veranstaltungen, Musik und Gespräche.

#09 Babelo Filmoj – über 2500 Abos

Der heute leider nicht mehr aktive Kanal veröffentlichte Kinderfilme auf Esperanto. Mit Abstand ihr bekanntestes Werk ist das Lied "Dek Bovinoj", das mittlerweile Kultstatus in der Esperanto-Internetkultur hat.

#08 Chelsea Rae Mose – über 2600 Abos

Chelsea ist eine junge amerikanische Esperantistin, die Videos über Esperanto, Tanzen und die Jiddische Sprache macht.

#07 UEAviva – über 3300 Abos

Der Kanal der UEA konzentriert sich wenig überraschend voll auf die Esperanto-Kultur, es gibt Aufnahmen von Kongressen, Vorträge und Gespräche.

#06 Keep it simple Esperanto – über 4000 Abos

Kanal der britischen Esperantistin Beki, mit Videos über das Lernen von Esperanto, das Reisen und zu vielen anderen verwandten Themen.

#05 Esperanto Variety Show – über 5000 Abos

Der amerikanische Esperantist Tomaso veröffentlicht hier Musik, Sketche, Lehrmaterial und vieles mehr.

#04 TEJO Esperanto – über 5700 Abos

Der Kanal von TEJO hat in den letzten Jahren massiv an Qualität gewonnen und veröffentlicht neben den üblichen Kongressvideos (darunter auch die bald drei Musicals der letzten Jahre in guter Qualität) auch Mini-Dokus und Interviews zu aktuellen Themen.

#03 Exploring Esperanto – über 7100 Abos

Der amerikanische Schauspieler Alex Miller veröffentlicht hier qualitativ hochwertige Esperanto-Lernvideos auf Englisch, Kurzfilme auf Esperanto und vieles mehr. Alex ist eine zentrale Figur der amerikanischen Esperanto-Bewegung geworden und auf diesem Kanal ist ein Großteil davon dokumentiert.

#02 Evildea – über 11 200 Abos

Überraschung! Evildea ist, anders als oft behauptet, nicht der größte Esperanto-YouTuber. Mit Sicherheit aber der bekannteste, aktivste und einer der ersten überhaupt. Der australische Esperantist mit eigenwilligem Stil arbeitet konsequent im klassischen Vlog Format und hat im Laufe der letzten 12 Jahre Esperanto-YouTube überhaupt erst zu einem Begriff gemacht.

#01 American Esperantist – über 15 300 Abos

Unsere Nummer 1 ist ein Lernkanal. Dieser leider seit fünf Jahren inaktive Kanal bietet Grammatik-Lektionen zu allen Aspekten von Esperanto und hat es unter dem Radar der meisten zum größten Esperanto-Kanal gebracht. Ich hoffe, jemand belebt diesen Kanal wieder und nutzt seine Reichweite, um das eindeutig vorhandene Interesse an Esperanto-Kursen mit neuen Videos zu füttern.

Links zu allen Kanälen findet Ihr in dem Vikipedio-Artikel „Listo de retaj videoservoj kaj videokanaloj en Esperanto“.

Stefan Grotz

Raporto pri 4-a GEJ-Semajnfino en Storkow (20–22 oktobro 2023)

En la semajnfino de 20–22 oktobro, grupo de GEJ-aktivuloj vizitis la kongresejon de la venonta JES. Per tiu ĉi vizito la junuloj ne nur ĝuis la 4-an GEJ-Semajnfino, sed ankaŭ malkovris kaj ekzamenis la eblecojn de la ejo por prepariĝi al la dua plej granda junularkongreso de Esperantujo. Unu el la malkovroj de la junulargastejo Hirschluch estis, ke la ejo kovras tre grandan areon en la arbaro kaj provizas pli ol sufiĉe da salonoj kaj eksteraj aktivajetoj. Tiu ĝojiga revelacio signifas, ke eblas organizi plurajn samtempajn programerojn senprobleme. La JES-organizteamo ankaŭ gustumis bongustaĵojn de la manĝejo kaj la ĝenerala impresoj estis kontentiga. Krom la organizaj kunsidoj kaj vesperaj ludoj, ne mankis ankaŭ la ekskurso al la urbcentro de Storkow (Mark). Kvankam la urbo kun siaj konstruaĵoj kaj naturo estas bela loko, mi ekopiniis ke ĝi estas iom tro trankvila kaj malplena. Eĉ la taksioj ŝajnis ne plu ekzisti. Kun tiu konstato mi finas tiun ĉi raporton, kara leganto, kaj esperas ke la venonta JES-etoso revigligos tiun belan urbon.

Utku Özdemir



Memfoto kun bubaloj dum 4-a GEJ-Semajnfino.

Raporto pri ĈAR en Katowico (8–10 septembro 2023)

Estas iom enuige skribi simple kronologie pri la okazaĵoj de renkontiĝo en artikolo, sed mi tamen faras, ĉar bezonatas por kompreni, kiom plena la programo de la semajnfina renkontiĝo estis.

Mia vojaĝo al la unua renkontiĝo de PEJ ekde 2019 komencis per malfrua trajno. La renkontiĝo komenciĝis vendrede matene, do mi planis jaŭde preni noktan trajnon post laboro. Mi maltrafis la noktan trajnon, do mi vendrede



Ekskurso en Katowico dum ĈAR.

matene prenis la venontan trajnkonekton, kiu veturigis min al malgranda urbo apud Katowico. De tie mi prenis BlaBlaCar kiu bonŝance veturis al la vilaĝeto tuj ĉe la piedo de la monto, kie la renkontiĝo jam komenciĝis.

Post duhora nokta promenado tra la arbaro mi finfine atingis la kongresejon de la unua nokto. La dua nokto de la renkontiĝo komenciĝis je la 5-a matene kun la sunleviĝo. Poste ni malsupreniris kaj prenis buson al apuda urbeto. Tie ni promenis dum kelkaj horoj por preni trajnon al Katowico.

En Katowico ni turismumis iomete kaj vizitis koncerton, kiu okazis pro la datreveno de la urbo. Post la koncerto ni iris al la mirinda amuzparko de Katowico. Kiam la amuzparko fermiĝis ni iris al trinkejo.

Kaj tio estis nur la programero de sabato. Unu tago de la renkontiĝo havis sufiĉe da programeroj por plenigi tutan semajnon. Mi diru ke malgraŭ la plenplena programo, mi neniam sentis min hastita, kaj estis sufiĉe da tempo por babili.

Mi certe rekomendus al ĉiuj: Aliĝu al ĈAR! La pasinta ĈAR estis kvazaŭ pinto de kio eblas dum semajnfina renkontiĝo kaj antaŭĝojis min pri estonta agado de la nova PEJ-estraro.

Jonas “Lino” Schulz

Vizito de la amuzparko dum ĈAR.



La 108-a Universala Kongreso en Torino, 29.7.-5.8.2023

Torino estas pli ol dumil-jaraĝa urbo, situanta en la nordokcidenta parto de Italio.

En ĝi troviĝas multnombraj muzeoj, galerioj, palacoj, placoj, kasteloj, parkoj, diversstipaj monumentoj, preĝejoj kaj aliaj religiaj konstruaĵoj. En la katedralo konserviĝas la fama Mortotuko (Sacra Sindone). La plej karakteriza monumento estas nepretervidebla turo kun bela kupolo. Temas pri la 167,5 metrojn alta La Mole Antonelliana. En ĝi estas instalita muzeo pri film-historio. La urbon trafluas la granda rivero Pado kun siaj tri alfluantoj. Torino estas konata pro siaj tradicioj en kuirarto: picoj, vinoj, kafoj, ĉokoladoj, glaciaĵoj, specialaj dolĉaĵoj kaj ankaŭ la aŭtomobil-firmao Fiat. Ĝia simbolo estas Taŭro. En la urbo troviĝas sennombraj verdaj fontanoj kun taŭra kapo, el kiu fluas trinkakvo.

En Torino jam okazis pluraj E-kongresoj. Ĉi-foje la kongresejo situis en la Politeknika Universitato de Torino. Al la kongreso aliĝis 1319 geesperantistoj el 69 landoj. Venis reprezentantoj el ĉiuj kontinentoj. La kongresa temo estis: "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj". Ĝi estis traktata en pluraj prelegoj.

Sabate la 29-an de julio la ĉina esperantistino Gong Xiaofeng (Arko) estis elektita kiel nova estraranino de UEA. Vespere okazis la kutima, kaj jam de pluraj jaroj ŝatata Movada Foiro, kie la diversaj E-asocioj prezentis sin per broŝuroj, propagandiloj kaj aliaj Esperanto-objektoj, kun la intenco akiri novajn membrojn por sia asocio.



Dimanĉe en la salono Zamenhof okazis la solena malfermo de la kongreso, fare de la prezidanto Duncan Charters kaj poste la kongresanoj kunfotiĝis. Tuj en la posttagmezo komenciĝis la kongresa programo: IKU-inaŭguro, paroligaj lecionoj, Ĉina Tago, Enkonduko al la Kongresa Temo, prelego pri Italio, Aŭtora duonhoru, Komitata Forumo, ILEI-prezento kaj aliaj prezentaĵoj. La tuta kongresa programo estis tre ampleksa, do ne eblas listigi ĝin, kaj ne eblis partopreni en ĉiuj eventoj, kiuj okazis samtempe en diversaj salonoj. Ĉiu devis mem elekti tion, kio plej konvenis kaj plaĉis.

Dum la Kleriga Lundo kaj la marda Tago de Lernado okazis multaj interesaj prelegoj, koncernantaj ne nur la lernadon. Tiuj tagoj estis tre aprezataj de la kongresanoj. Dum la semajnaj antaŭtagmezoj eblis aŭskulti koncertojn de Grazia Barboni, Flut-tripo, Kimo, Kajto, Bardoj, JoMo, Jomart kaj Nataŝa, Kjara, Abel kaj spekti teatraĵojn: "Ludoj kun diablo kaj reĝo" aŭ "D-ro Esperanto".

Vespere okazis jenaj programeroj: Nacia Vespere, Bankedo kaj Kongresa Balo, Teatraĵo "Mi diros al vi sekrete", en prezento de Georgo Hanzlik kaj Saŝa Philipoviĉ, koncerto "Blua Horizonte" kaj "Internacia Arta vespero".

Ĵaŭde posttagmeze okazis la tradicia futbal-matĉo, en kiu ĉi-foje venkis je 6:3 la teamo de esperantistoj kontraŭ tiu de perujaj enmigrintoj.

En la enirhalo sukcese prezentiĝis membroj de la venonta kongreso en Tanzanio, vendante multajn interesajn objektojn al la geesperantistoj. La tanzania ambasadorino en Italio montris sian ĉeeston inter la venontjaraj organizantoj de la kongreso en Aruŝa. Ankaŭ ĉeĥoj vendis diversajn artiklojn (ĉemizojn, librojn kaj italajn vinojn), por profitigi la venontjaran kongreson. En



la vestiblo estis instalita libroservo. Tie eblis aĉeti librojn donace por Tanzanio, sed ne nur. Samloke okazis aŭtoraj duonhoraj prezentadoj de diversaj libroj. Kiel kutime okazis ankaŭ Esperanto-kursoj kaj KER-ekzamenoj de ĉiuj niveloj. Aperis pluraj artikoloj en ĵurnaloj.

Dum la kongreso prezentigis pluraj asocioj. Okazis Ekumena Diservo, Erasmus+, TEJO sinprezentas, Internacia koruso, Ŭonbulismo, Bona Espero, Belartaj konkursoj, Oratora konkurso, UNO kaj UNESKO, prelegoj pri Italio, itala lingvo, meditado, vorto-ludoj, Afriko, Eŭropo, Ameriko, Juristoj, Esperantologia Konferenco, Libro de la jaro, Bobelarto, Komitata forumo, UEA respondas, Aŭkcio, Greziljono, Venontaj UK-oj, Scienca Forumo, Ateliero pri origamio*. La kongresa kuriero "La Taŭra voĉo" informis pri aktualaĵoj kaj ŝanĝoj en la programo.

En la korto esperantistoj ne nur dancis, sed ankaŭ lud-lernis. Multnombraj estis duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj al interesaj lokoj de la lando, kiuj allogis ĉiutage multajn partoprenantojn.

Dum la solena fermo prezentigis infanoj el sia kongreseto kaj ĉe la fino estis transdonita Esperanta flago al la reprezentantoj de la venonta UK en Tanzanio. Ĉiuj estos bonvenaj partopreni la kongreson, okazontan unuafoje en la Afrika kontinento.

Kion diri ĉe la fino? Koncize, ke ĝi estis tradicia kongreso, kun tradiciaj temoj, prelegoj, amuzadoj. La Landa Kongresa Komitato preparis buntan kaj interesan semajnan programon kaj zorgis pri ĝia bona disvolvigo. Do, gratulon al la organizantoj de tiu ĉi impona evento.

Liba Gabalda

*) <https://revuoesperanto.org/origamio>



Rata Rendezuo:
bela ripozejo
en Ĝardena
Ekspozicio.



Eĉ bananoj kreskas ĉe monaĥeja muro.



Ĉe la bordo de Vezero - la unuaj impresoj pri la ekspozicio.



Ripozante sur benkego en Ĝardena Ekspozicio.





Ĉu la fiŝkaptisto kaptas esperantistojn?

Anzeige

www.primas-software-international.com

Kisu min veka!

108-a Universala Kongreso de Esperanto



Esperanto, la lingua universale dell'amicizia tra Poli e Ogr il congresso con 1.200 delegati

BONVENON AL LA EKSTERORDINARA UNIVERSALA KONGRESO ARUŠA, KILIMANĜARO 2024



Esperanto-Asocio de Tanzanio, kunlabore kun Afrika Komisiono de UEA